James Yorkston,

## Moliino Malon'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1. En bela Dublino,
Jen vivis knabino,
Enamiĝis unue en tiun ĉi mi.
Ĉareton ŝovante
Tra l' stratoj irante
Ŝi vokis : Jen konkoj, jen ostroj! Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tutfreŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi, ho!

2. Veturis ŝi tiel
Tra l' stratoj samkiel
Ĝin faris antaŭe gepatroj de ŝi.
Sian ĉaron ŝovante,
Tra l' stratoj irante
Vokante : Jen konkoj, jen ostroj! Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tutfreŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi, ho!

3. Ŝi iĝis malsana,
Sanig' estis vana,
Memoras mi ĉiam ankoraŭ pri ŝi,
Tra l' stratoj iranta,
Ĉareton ŝovanta,
Vokanta: Jen konkoj, jen ostroj! Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tutfreŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi, ho!

...

James Yorkston,

## Molly Malone

In Dublin's fair city,
Where girls are so pretty,
I first set my eyes on sweet Molly Malone,
As she pushed her wheelbarrow
Through streets broad and narrow,
Crying, Cockles and mussels, alive, alive oh!
Alive, alive oh! alive, alive oh!
Crying, Cockles and mussels, alive, alive oh!

She was a fishmonger,
And sure twas no wonder,
For so were her mother and father before,
And they each wheeled their wheelbarrow,
Through streets broad and narrow,
Crying, Cockles and mussels, alive, alive oh!
Alive, alive oh! alive, alive oh!
Crying, Cockles and mussels, alive, alive oh!

She died of a fever,
And no one could save her,
And that was the end of sweet Molly Malone.
Now her ghost wheels her barrow,
Through streets broad and narrow,
Crying, Cockles and mussels, alive, alive oh!
Alive, alive oh! alive, alive oh!
Crying, Cockles and mussels, alive, alive oh!

...

James Yorkston,

## Molly Malone

*tradukita de Jean-Marc Leclercq*

En bela Dublino,
kie ravas la ino,
Ekvidis dolĉegan mi Molly Malone.
Ŝi travagis stratarojn
puŝante la varojn.
"Kardioj! Mituloj! Aĉetu de mi!"
Ho freŝajn kardiojn,
Ho vivajn mitulojn,
Moluskojn vivegajn proponas mi!

Estis ŝi vendistino,
sed ne miris Dublino,
Ĉar ankaŭ tiel faris gepatroj de ŝi.
Ili vagis stratarojn,
puŝante la varojn,
"Kardioj! Mituloj! Aĉetu de mi!"
Ho freŝajn kardiojn,
Ho vivajn mitulojn,
Moluskojn vivegajn proponas mi!

Jen febro ekfortis,
pro tio ŝi mortis,
La fino alvenis al Molly Malone.
Fantomo nun vagas,
neniu nun pagas
Por kardioj, miltuloj puŝataj de ĝi.
Fantomajn kardiojn
Fantomajn mitulojn,
Fantomajn moluskojn nur vendas nun ĝi.

...

*Traduko de la Angla poemo "Molly Malone" de James Yorkston en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2006-12-04.*

*MR-451-2 (Esperanto) / Arg-374-735 (2008-11-29 16:14:27)*

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas James Yorkston.*

*Arg-374-733 (2013-11-25 12:31:14)*

*Pri la kanto vidu la retejojn* `http://homepage.eircom.net/~seanjmurphy/irhismys/molly.htm` *kaj* `http://homepage.eircom.net/~seanjmurphy/irhismys/mollylyrics.htm`*. En la unua retejo estas indikitaj ankaŭ la muziknotoj. Vidu ankaŭ la germanan version de la vikipediejo pri Molly Malone:* `http://de.wikipedia.org/wiki/Molly_Malone`*. Legu ankaŭ:* `http://en.wikisource.org/wiki/Molly_Malone`*.*

*Traduko de la Angla poemo "Molly Malone" de James Yorkston en Esperanton de* JEAN-MARC LECLERCQ *(∗1961-10-10).*

*Arg-374-1886 (2013-11-25 11:01:43)*